

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ĉikago №1 Januaro, 2010

Kara Leganto! Denove venis la tempo por saluti vin per la tradiciaj vortoj “Feliĉan Novan jaron!” Kaj denove, tradicie, gratulas nin urbestro de nia partner-urbo Milano kaj verse – nia rusia gasto de la 2007 jaro Mikaelo Bruna Ŝtono. Plendanke ni (la redakcio, kiu perdis nian vervan teamanon – d-ron Puramo Ĉong) publikigas lian salut-poemon. Bunte kaj interese nia E-societo pasigis la plej gravan E-eventon de la jaro – jubilean datrevenon de la iniciatoro de nia kara lingvo, d-ro Esperanto, L.L. Zamenhof (vd raporton sube). Estu sanaj kaj feliĉaj, sukcesojn al vi (ni) sur la verda tereno!

–La Redakcio

Alvenas la tempo, ke ni adiaŭu la jaron –  
Malbonan aŭ bonan, sed ja travivitan – do karan  
Almenaŭ per kelkaj momentoj, griziĝon bremsintaj,  
Manpleno da helaj eventoj, festene pasintaj.  
Alvenas la tempo forŝiri malnovan folion –  
Malbonan aŭ bonan, sed ja travivitan – do nian,  
Kaj serĉi naive en virga pureco de l’ nova  
Ĝermetojn de l’ fajra feliĉo kaj ĝojo bontrova.  
–Mikaelo Bronŝtejn

## Zamenhofs Tago 2009!

Mi persone partoprenis nur ses lastajn Zamenhofajn bankedojn en Ĉikago, sed oni devas konfesi, ke la Zamenhofs Tago’2009 ne similis al la pasintaj: dank’al penaj streboj de nia nuna vic-prezidanto d-ro Les Kordylewski (ni-li provis fari tion en 2007) nian festenon vizitis tre grava persono – Vic-konsulo de la Respubliko de Pollando en Ĉikago, s-ino Aleksandra Krystek (sur la foto: V. Pajuk, E-flago, A. Krystek, L. Kordylewski). Se kutime ni kolektiĝis en iu etna restoracio (ukraina, persa, korea, taja ktp.), ĉi (2009) jare nian solenan aranĝon gasteme akceptis salono de la plej alta 18-etaĝa konstruaĵo de Evanstono (norda suburbo de Ĉikago) SkyLine at Evanston. Organizintoj de la solenaĵo ankaŭ zorgeme klopodis por transdoni al la ĉeestintoj la aŭtentikan kuirarton de la epoko de

Zamenhofs: estis proponitaj simplaj “vilaĝanaj” manĝaĵoj, iam kutimaj en jud-urbetoj de la XIX-a jarcento: funga supo, bet-radika salato, divers-speca kokidaĵo, sendube – dolĉaĵoj.

Post la kelkminuta gratulvorto de la societ-prezidanto V. Pajuk kaj solena kantado de “La Espero”, E-istaron reciproke tostis (per ruĝa aŭstralia vino kaj “Sovetia” ŝaŭmvino) s-ino Vic-konsulo. Alloke, s-ino

Aleksandra havis la polan tradukon de la E-himno, do, ŝi ne nur komprenis la vortojn, sed, espereble, eksentis la profundecon de la Interna ideo. Ĉefa vokalo de la E-himno estis iama operkantisto (Pitsburga Opero), s-ro Brusio Stigers.

K u l t u r a programo estis kaj estas sendividinda kaj tradicia parto de niaj solenaĵoj: ĉi foje ni ĝuis flutludon de Tina Seastrom, gitarludon de Bayron Eguiguren, deklamadon



de la propraj E-poemoj fare de Gregoro Dolgin. Kutime, dum la Zamenhofa tago oni festas ankaŭ la Tagon de la E-libro. Pri tio oni povas ricevi informon de nia decembra numero, sed ĉi-jare ni klopodis renaski en nia E-societo iaman eldonad-tradicion: okaze de la 200-jara naskiĝ-datreveno de la fama usona romantikulo kaj la fondinto de la krim-ĝenro Edgar Allan Poe ni aperigis dulingve (IL-e tradukis eminenta ano de ESdŜ s-ro Jon Willarson), dank'al sennombraj mon-subtenantoj (usone – sponsoroj), lian renoman poemon “La Korvo/The Raven”. La libro estas bele ilustrita fare de ukraina pentristo kaj E-isto Niko Voloŝin. Dum la Zamenhofa tago la poemo, konsistanta el 18 strofoj, estis deklamita fare de 9 deklamintoj en 9 lingvoj, ĉiu elbuŝigis 2 strofojn. La rezulto estas neimagebla – en nuntempa Babilono ni bezonas ESPERANTON, sed ne usonan dialekton de la angla, ĉu? –*Araneo*



## Rezultoj de la Balotado

Vi jam estis informita, ke dum la novembro (2009) kunsido oni ne sukcesis organizi balotadon por la 2-jaraj postenoj de la E-societo de Ŝikago pro la manko de kvorumo. Sed dum la Zamenhofa Tago' 2009 pli ol 20 membroj partoprenis balotadon (voĉojn kalkulis kasisto Karlo Gunn). Do, rezulte okazis nur unu ŝanĝo – postenon de la vic-prezidabto, anstataŭ d-ro Puramo Ĉong, kiu translokiĝis al Distrikto de Kolumbio, okupis d-ro Leszek Kordylewski, E-isto kun 50-jara staĝo. Gratulojn al ĉiuj!

## Dankon!

La multjara membro de la E-societo de Ŝikago s-ro Walter Cebulski, MD, malavare donacis al la agado de nia E-societo \$1000.00 – jes, unu milon da usonaj dolaroj. Altestimata s-ro Walter, koran dankon pro la via bonfaro! Imitinda afero, ĉu?

## Interese!!!

– En Odesa junulara E-klubo “Verdaĵo” (Ukrainio) estis kreita originala videofilmo pri L.L. Zamenhof kaj Esperanto. La filmo estis dediĉita al la jubilea jaro de la Majstro kaj montrita unue en Odesa televido januare.

– La 13an de Decembro Viktor Pajuk estis gasto de ruslingva radioprogramo (1330 AM); sekvanttage (lundo, 14an de Decembro) Les Kordylewski parolis pri LL Zamenhof kaj lia kreaĵo – Esperanto – en elsendo de pollingva radiostacio 1080 AM. En la sama tempo aperis en gazetaro po du ruslingvaj artikoloj de G. Dolgin k V. Pajuk k 2 ukrainaj artikoloj de Araneo.

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktoro Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn  
828 S. Ada St,  
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**  
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**  
**Kunvenoj komenciĝas**  
**je 7 p.t. en la Suda**  
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj

- 26an de Januaro – Bruso Stigers rakontos pri sia mirakla vojaĝo al La Urbo de Sala Lago
- 23an de Februaro – Gregoro Dolgin estos nia ĉiĉerono en la mondo de Am-poezio (ĉiuj estas invitataj partopreni deklamadon de la ŝatata liriko)
- 23an de Marto – Andreo Kolganov kun temo “Skrib-sistemoj por la uzbeka lingvo: spertoj de la XX-a jarcento”
- ... 27an de Junio – Tradicia Pikniko

